WIKIPEDIA

Taa lingvo

La **taa lingvo**, ankaŭ nomata **!Xóõ**, estas la lasta praktike uzata lingvo de la tua lingvofamilio, antaŭe nomita "sudkojsana". Ĝi estas parolata en Kalaharo de inter 3000 kaj 4000 homoj en Bocvano kaj proksimume 200 en Namibio. Ĝi estas la lingvo kun la plej ampleksa fonemaro, sed ĝia sintakso similas al tiu de aliaj SVO-lingvoj.

Taa lingvo	
!Xóõ	
Parolata en	Bocvano, Namibio
Parolantoj	4 200
Lingvistika klasifiko	
Tua lingvaro	
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	khi
ISO 639-3	nmn
Glottolog	taaa1242
Angla nomo	Taa
Franca nomo	taa

Enhavo

Fonemaro
- Vokaloj
- Konsonantoj

Fontoj

Eksteraj ligiloj

Fonemaro

Vokaloj

La lingvo havas nur la kvin vokalojn /a e i o u/, la samajn kiel en esperanto, sed la taa estas tonlingvo. Laŭ detala studo de unu el la taaj dialektoj[1], kiu estas la fonto de la sekva priskribo, distingeblas kvar tonoj, nome alta (á), centra (a), malalta (à), kaj centra-fala (â). Krome la voĉtipo estas signifodistinga. Aldone al la ĉiulingve uzata modala voĉo ekzistas spira kaj knara voĉoj, ĉe la vokaloj /a o u/ ankaŭ faringa voĉo. Ĉe la vokaloj ankaŭ nazaligo estas signifodistinga.

Konsonantoj

La konsonantaro de la lingvo konsistas el 29 neklaketoj kaj pli ol 80 malsamaj klaketoj.

Konsonantoj krom klaketoj:

	bilabiala	dentala	dentaleca	velara	uvulara
senvoĉa plozivo	p	t	ts	k	q
senvoĉa aspirita plozivo	pʰ	tʰ	tsʰ	kʰ	qʰ
voĉa plozivo	b	d	dz	g	ɢ
voĉa aspirita plozivo	bʰ	dʰ	dzʰ		
ejektivo			ts’	kx’	q’
prevoĉa ejektivo			dts’	gkx’	
senvoĉa frikativo			s	x	
nazalo	m	n			
glotala nazalo	mˀ	nˀ			

Ne montritaj en tiu tabelo estas kelkaj marĝenaj konsonantoj kies fonema statuso estas diskutebla.

Klaketoj:

	bilabiala	dentala	alveolara	palatala	laterala
senvoĉa	k0	k|	k!	k‡	k‖
glotala	k0ˀ	k|ˀ	k!ˀ	k‡ˀ	k‖ˀ
aspirita	k0ʰ	k|ʰ	k!ʰ	k‡ʰ	k‖ʰ
afrikata	k0x	k|x	k!x	k‡x	k‖x
ejektiva afrikata	k0x’	k|x’	k!x’	k‡x’	k‖x’
voĉa	g0	g|	g!	g‡	g‖
voĉa aspirita	g0ʰ	g|ʰ	g!ʰ	g‡ʰ	g‖ʰ
voĉa afrikata	gk0x	gk|x	gk!x	gk‡x	gk‖x
voĉa ejektiva afrikata	gk0x’	x’	gk!x’	gk‡x’	gk‖x’
nazala	ŋ0	ŋ|	ŋ!	ŋ‡	ŋ‖
preglotala nazala	ˀŋ0	ˀŋ|	ˀŋ!	ˀŋ‡	ˀŋ‖
senvoĉa uvulara	q0	q|	q!	q‡	q‖
ejektiva uvulara	q0’	q|’	q!’	q‡’	q‖’
voĉa (prenazala) uvulara	ɢ0	ɢ|	ɢ!	ɢ‡	ɢ‖
voĉa (prenazala) uvulara aspirita		ɢ|ɦ	ɢ!ɦ	ɢ‡ɦ	

Krome ekzistas 5 velaraj klaketoj sekvataj de uvulara ejektivo kaj 5 velaraj ejektivaj klaketoj sekvataj de uvulara ejektivo, kiujn oni povas analizi aŭ kiel fonemojn aŭ eble kiel kombinojn de klaketo plus ejektiva uvularo.

Fontoj

1. ↑ Traill, Anthony (1986) *Phonetic and Phonological Studies of !Xóõ Bushman* (Quellen Zur Khoisan-Forschung, No 1), Hamburg: Helmut Buske, ISBN 3-87118-669-4.

Eksteraj ligiloj

- Taa language (http://dobes.mpi.nl/projects/taa/language/) (Dokumentation Bedrohter Sprachen)
- Ethnologue (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=nmn)
- UCLA Archive (http://archive.phonetics.ucla.edu/Language/NMN/nmn.html) (aŭskultebla)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Taa_lingvo&oldid=5631885"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:34, 11 mar. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.